

# Ĉineske

(XII)

**e-Librigita de Elerno**

**marto 2010**

## **Busuanzi (Aŭguristo)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de  
55,75 silaboj kun duona rimo.

### **Eto**

#### **Densa nebulo**

pendas malalte  
blanka vualo  
videblas jam nenio  
en aktualo

vojon palpserĉas  
kontraŭ misfalo  
homoj tree diskrete  
en urba palo

### **Niuniu**

#### **Spektado al neĝado**

flirtas neĝflokaj  
plume leĝere  
la ter' kovriĝas lante  
blanke butere

malmultas homoj  
jam ĉevespere

**lampoj eklumas kaj neĝo  
brilas surtere**



# Caisangzi

## (Moruskolektanta Knabino)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po kvar versoj de  
74,4,7 silaboj, laŭ rimaranĝo de xa, a,a. (x=senrima)

**Viktoro**

### Blanka polucio

**mincaj plastikaj sakoj  
en rivero  
sur la tero  
troviĝas en libero**

**baldaŭ ili sieĝos  
per despero  
per konkero  
la mondon kun prospero**



# Chaitoufeng

## (Feniksa Harpinglo)

ĉina fiksforna poemo el du strofoj po ok versoj de 3,3,7;  
3,3, 44, 1, 1\*, 1\* silaboj, kun rimaranĝo de aaa, bbxBBB  
kaj la lasta verso de strofo devas esti tri samaj silaboj.

### Vejdo

#### Revenĝo de la Tero

la tertrem'  
malsatĝem'  
mondo dronas en dilem'  
pro detru'  
pro tondr-bru'  
ni panikas  
kun kora sku'  
nu, nu, nu

veterprem'  
akv-problem'  
puŝas mondon al ekstrema'  
sen volb-blu'  
sen akv-flu'  
ni suferas  
en kontinu'  
ĉu, ĉu, ĉu

# Changxiangsi

## (Longa Sopiĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de 3, 3,  
7, 5 silaboj kun kontinua rimo.

## Cezar (Germanujo)

### Espero



Jokero

**Jokero  
espero  
estas homa afero,  
tute ne vero!**



Pasero-Spatz

**Pasero-  
espero  
estas manĝotelero,  
sed kun manĝero.**

## **Vejo**

### **Sopire al mia fraŭlino**

**sopiro  
sen diro  
premas min per senspiro  
kia korŝiro!**

**suspiro  
ve, viro  
feblas sen fortotiro  
pli kun deziro**



# Chaozhongcuo

## (Pedanta Klerulo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj  
respektive de 7,5,66 / 444,66 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa  
/ xxa,xa (x=senrima).

**Lily**

### **Mi ne volas vundi vin**

**mi jam ploris sensone  
kaj senadmone  
mi ne volas vundi  
vin ne senpardone**

**ni gekunis  
vi rifuzis  
perordone  
vi diris decide  
“ni restu platone”**

**mi jam ploris korŝire  
kaj eĉ delire  
mi ne volas vundi  
vin kaŝe konspire**

**mi forlasis**



**vin nevole  
sed aspire  
al la viro kiu  
viglas seks-altire**



## **Daolianzi**

### **(Kanto de Lavantino)**

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ  
rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

## **Yanke**

### **Vintra sunlumo**

**tepida  
la sunlum'  
kvazaŭ natura brakum'  
donas varmon al homoj  
pere de glaso da rum'**

**ekĝojas  
florĝarden'  
herboj jam nun sen ĉagren'  
skuetas siajn brakojn  
plantoj ekĝermas kun pen'**

## **Dianjiangchun**

### **(Ruĝigitaj Lipoj)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 4 kaj 5 versoj  
respektive de 47,4,5 / 45,34,5 silaboj, laŭ rimaranĝo  
xa,a,a / xa,xa,a (x=senrima)

### **Cezar (Germanujo)**

#### **NUR LUD' ESTAS AM'**

**Ne necesas  
plori pri pasinta am',  
pri bel' de dam'  
kun brua deklam'.**

**Ne revenas  
la am' laŭ program'.  
Neamat',  
sciu do jam:  
nur lud' estas am'.**

### **Lily**

#### **Nova amo**

**ne necesas  
penti pri malnova am'  
ĝi nur 'stas dram'**

**kun mortinta flam’**

**brave iru  
per kora proklam’  
al amat’  
nova nun jam  
por lud’ sur tatam’**



## **Dielianhua**

### **(Papilio Super Floroj)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de  
7,45,7,7 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,a,a (x=senrima)

#### **Sero**

#### **Alvoko al papilio**

**alvoko al papili’  
ŝvebas trae  
en suna radi’  
super flora poezi’  
super polena premi’**

**jam degelis la glaci’  
printempa lum’  
brilos sen envi’  
alvoko al papili’  
flosas jen en fantazi’**

## **Dingfengbo**

### **(Subigo de Ŝtormo)**

Ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 5 kaj 6 versoj  
respektive de 7,7;7,2;7;/ 7,2;7,2;7; silaboj, laŭ rimarĝo  
aabba/ccdeed

### **Cindy Mckee (Usono)**

#### **Tempo en la urbo**

**lumiĝas betonbestoj  
kun homoj en intestoj,  
organika dekokto  
Nokto  
falos ni post digestoj**

**trafiko fluis onte  
fonte  
el ŝtalo kaj betono  
porta, pasiva ago  
Tago  
bestoj turas en fono**

#### **Besta konduto**

**Se ni estus nur griloj  
vi amkantus en triloj  
per ĉarmaj flugildentoj,**

tentoj  
laŭ ĉirp-ĉirpaj babiloj.

Al ternesto mi saltus,  
haltus,  
multajn ovojn donacus,  
viajn flugilojn hakus,  
grakus,  
kaj kunvivi aŭdacus.

## Niuniu

### Paŝoj de tagoj

sonas paŝoj de tagoj  
nun en miaj imagoj  
trans riverojn kaj montojn  
pontojn  
rapide kiel sagoj

trans mizeran vivvojon  
ĝojon  
filmsimile en memor’  
notas tempo pogute  
tute  
ĉion veran sen rankor’

## **Fendieer (Papilio)**

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj po 8 versoj de  
10,34,334,36 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,xxa,xa  
(x=senrima)

### **Sam**

#### **Ampoemo**

**krom ĉi poemo nenion al vi  
mi donas  
ĉar nure mi  
malfortas  
malriĉas  
sed kun pasi'  
poemojn  
verki kiel hobi'**

**mi dankas vin pro via aŭspici'  
vi ĝuas  
kun simpati'  
la versojn  
faritajn  
per energi'  
ho mi nur  
restas kun poezi'**



## Fengrusong

### (Vento Inter Pinoj)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj  
respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ  
rimaranĝo a,a,xxa,xa /a,a,xa,xa (x=senrima)

(La jenaj poemoj publikigitaj ĉe [www.ipernity.com](http://www.ipernity.com) estas  
aranĝitaj laŭ la datoj de afiŝafo.)

## Mandio

### Dorsfiguro de vintro

**vintro lante iris for  
kun penetra bor'  
dorsfiguron la vintran  
rigardas  
kun ĝoja kor'  
mi dankeme vere  
per malŝata ignor'**

**for, vi fridiga aktor'  
en arda sunglor'  
jen foriru kune kun  
miaj malĝoj' kaj langvor'  
ĉagreno kaj ĝeno  
ankaŭ malbonhumor'**

## **Genglouzi (Kanto de Akva**

### **Horloĝo en Nokto)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po ses versoj de  
33,6;33,5; / 33,6;33,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xaa,xbb /  
xcc,xdd (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

#### **Sonĝo de akvoguto**

**Guteto  
scintilas,  
silente oscilas  
sur sojlo.  
Sinnulo,  
nur mondspegulo.**


**Gutego  
graveda  
de bildo hereda,  
hezitas  
ĉe falo—  
ties realo.**

# Eto

## Nokta pluveto

**pluveto  
leĝere  
verŝiĝas libere  
en vento  
el la mar'  
en ĉi februar'**

**frideta  
pluva flu'  
malsekas kun algu'  
la harojn  
de knabin'  
atendanta lin**



## Guizhixiang

### (Aroma Laŭrbranĉo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 4, 54,  
64,734,444 / 7,54,64,734,444 silaboj, laŭ rimaranĝo  
a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xxa (x=senrima)

### Eto

#### Floro ĉe rojo

**ĉe roj' la flor'  
staras silente  
en luma glor'  
jam dum kelk printempojn  
ŝi kun ador'  
spektas rojan torenton  
eosten  
flui kun ror'  
trans kampton  
trans herbejon  
al svaga for'**

**la rojo kiel trezor'  
en ŝia vivo  
je ĉiu hor'  
ŝin akompanas jam  
kaj per sonor'**

**kaj per flua simfoni'  
ŝi volas  
en la memor'  
teni firme  
lin eterne  
kun tuta kor'**



## **Haoshijin**

### **(Proksimiĝas Bona Afero)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 56,65 /  
75,65 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa / xa,xa (x = senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

#### **Ekspertaj Valentenoj**

**Plipoluritaj  
niaj koroj trotras  
inter ostaj brosoj  
kiuj rabotas.**

**Niaj plisaĝigitaj  
mensoj pilotas  
per neŭronoj kiuj  
sperto nin dotas.**

**Pli respondemaj  
niaj fingroj estas  
pro tuŝo de vivo  
kiu enrestas.**

**Pli da gefelicŭloj  
ame atestas  
ĉiun amtagon**

kiun ni festas.

### Sentitole

vojon de birdo  
sekvas birdo griza  
en serĉo de grajno  
kaj frukt' ĉeriza

sed la pli juna frato  
en mov' surpriza  
lerte preterflugis  
al festo riza

## Eto

### Mia penso vagas

la penso vagas  
en ĉi valententag'  
junec' jam vanuis  
sen aŭdaca ag'

nun mi ankoraŭ solas  
kun amo en svag'  
ĝis oldeco mi min  
tenas je memblag'

# **Vejdo**

## **Ekrideto de l' primavero**

**je ekrideto  
de la primavero  
trile kantas birdoj  
vekiĝas tero**

**floroj ĝoje disfloras  
jen en prospero  
rojo fluas fole  
kun glugla kvero**





## Heshengchao

### (Gratulo al Sankta Dinastio)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj 4 kaj 5 versoj  
respektive de 7,5,75 / 44,5,75 silaboj, laŭ rimaranĝo  
a,a,xa / xa,a,xa (x=senrima)

### Vejdo

#### Ardeo

Ĉe roĵo blanka arde'  
avidemas je  
fiŝoj naĝantaj vigle  
jen ire kaj re.

Ŝi ekmiras,  
“Kial, ho ve,  
fiŝoj al pere'  
flosas mortaj surakve?”  
Nenia ide'.

## **Hexinlang**

### **(Gratulo al Novedzo)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj  
respektive de 5,344,76,7,78,33 / 7,344,76,34,78,33  
silaboj, laŭ rimaranĝo a,xxa,xa,a,xa,xa / a, xxa, xa, xa,  
xa,xa (x=senrima)

## **Vejdo**

### **Preĝado ĉe Printempa Festo (2010)**

**printempa radi’  
alportas  
ĝojan feston  
de tradici’  
kun bela bondeziro  
kaj denova pasi’  
ni varme kun ĝoj-ebri’  
orgiu kaj festenu  
de famili’ al famili’  
por hejmo  
riĉa pli**

**ni kune preĝu kun pi’  
por paco  
de la mondo  
por harmoni’**

**de l' intergenta vivad'  
por popola konsci'  
pri sana  
bona medi'  
por akordiĝi inter  
landoj sen diskriminaci'  
do penu  
ĉiuj ni**



## **Heyebei (Lotusfolia Taso)**

ĉina fiksforma poemo el 6 versoj de 6,2:3;7,2;3 silaboj,  
laŭ rimarangô aab,ccb

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Sentitole**

**Sur lotosa rondo  
ondo  
petolas.  
Rose rulas sin; ĝue  
flue  
kaĵolas.**

**Yanke**

### **Roso sur lotoso**

**kun rebrilo suna  
juna  
eta ros'  
rule ludas libere  
vere  
sur lotos'**

# **Vejdo**

## **Libelo**

**glite flirtas libel'  
kun bel'  
zomgira  
jen ekplonĝas al foli'  
sen kri'  
reira**



# Huanxisha

## (Silk-lava Rojo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po tri versoj de sep silaboj laŭ rimarango aaa / xaa (x=senrima)

Lily

### Aspiro

ni iras manon en man'  
sur la voj' de makadam'  
al la kaŝita kaban'

aspiras al amludo  
ni pasie sur tatam'  
kun amora uragan'



## **Jiangchengzi (Riverborda**

### **Urbo)**

ĉina fikforma poemo el samaj du strofoj po 8 versoj de 7,  
3,3,45,733 silaboj, laŭ rimarangô a,xa,a,xa,xa (x =  
senrima)

### **Cezar (Germanujo)**

#### **Morta urbo**

**Robotino**  
**sin venĝis ĝis la fino.**  
**Ĉiuj homoj**  
**formortis en la domoj**

**Urbo morta,**  
**nur verdokresk' senvorta.**  
**Nun formikoj**  
**sin setlas en fabrikoj.**

### **Eto**

#### **Planti ŝtonpecon**

**per trijara korinklin'**  
**al fraŭlin'**  
**kun obstin'**  
**li poluris**

**štonon el ruin'  
en brilan gempecon por  
plaĉigi  
karan ŝin**

**sed ŝerctrompis la destin'  
ĉiam lin  
ĝis la fin'  
li misfradis  
ŝancon pro kapŝpin'  
do li vole nevole  
en teron  
plantis ĝin**





## **Jiangnanchun**

### **(Printempo Sude de Rivero)**

ĉina fikforma poemo el 6 versoj de 33,55,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,xa (x=senrima)

#### **Printempaj paŝoj**

##### **Viktoro**

eksonas  
susure  
paŝoj printempaj  
ĝoje plezure  
ĝermoj volas aspire  
renkonti ŝin konkure

malfermas  
la tero  
siajn okulojn  
kaj la rivero  
etendas la brakojn al  
venanta primavero

##### **Vejdo**

ekblovas  
zefiro  
inter herbetojn

**per bondeziro  
ili balancas kapojn  
kun libera elspiro**

**disfloras  
persiko  
kun ruĝfloroj en  
pompa liriko  
burgonoj en venteto  
skuiĝas kun uniko**

## **Lily**

**dorskuŝas  
belulin'  
sur verda herbej'  
kun honta kapklin'  
ŝi en printempa sunlum'  
ameme sopiras lin**

**en blovo  
de brizo  
ŝi sentas varmon  
de lia kiso  
ili sin premas korpe  
ĝenas mola ĉemizo**

## **Cindy Mckee (Usono)**

**hezitaj  
la paŝoj  
kiel printempo  
en ventaj draŝoj  
dubas proprajn burĝonojn  
hezitaj liaj paŝoj**

**en herboj  
ascendaj  
kun vivesperoj  
tiel pretendaj  
sub malforta sunlumo  
kuŝas kredoj atendaj**

**sopire  
ŝi soras  
ŝi levas fingrojn  
tuŝon memoras  
en tre frua printempo  
nur fortuloj amoras**

**la fingroj  
levitaj  
trovas favoron  
Revoj revitaj  
relevas kapon vive**

en jesoj ricevitaj

## **Viktoro**

aromo  
la flora  
flosas en aer'  
sub lum' sunglora  
portas printempan vokon  
per ventblovo favora

## **Eto**

el vintra  
kruelo  
bestoj ekviglas  
post neĝdegado  
ili flaras irante  
por printempa fabelo

en friska  
akvfluo  
du blankaj cignoj  
naĝas kun ĝuo  
flosas tien kaj reen  
fole ludas kun skuo

abeloj  
en aro  
flugas serĉante

por flor-nektaro  
jen supren jen malsupren  
celante sen eraro

la urso  
ŝancele  
paŝas el kavo  
direkte cele  
al abelujo jen por  
suĉi mielon ŝtele

## Lily

**Kampa oper'**  
sub arbo  
milda kver'  
fluas glite en  
printempa vesper'  
en firma brakumado  
dronas la par' en buter'

intimas  
ili per  
pluvo da kisoj  
kun lipa tener'  
mordetas kaj karesas  
ili per mana leĝer'

li palpas

**kun esper'  
ĝis ŝia subo  
al la mola er'  
jam humida pro suko  
kiu fluas en prosper'**

**ŝi simple  
kun prefer'  
kuŝiĝas rekte  
sur herbhava ter'  
ŝi atendas soife  
lian boron sen danĝer'**

**li klinas  
sin super  
ŝin por langleki  
mamon de fier'  
li buŝe ludas kun ĝi  
kun intenco de konker'**

**ŝi krias  
en liber'  
iom tordiĝas  
ĝemas sen toler'  
ŝi volus la eniron  
de lia dura paser'**

**li vigle**

kun ofer'  
per kaco serĉas  
truon de mister'  
fine li eniras ŝin  
jen kun forto de moder'

ŝia muĝ'  
en aer'  
flosas per zefir'  
en ĝoja mizer'  
ili prezentas ludon  
aman per kampa oper'

## **Vejdo**

ankoraŭ  
en glaci'  
arb' etendas jam  
branĉojn sen foli'  
volante sin vesti per  
junverdo sub sunradi'

gravedaj  
je pasi'  
burĝonoj skuas  
neĝon for de si  
por disflori libere  
en printempa famili'

## **Cindy Mckee (Usono)**

**ekstere  
mi kuras  
en la printempo  
vivo susuras  
tra malelastaj vejnoj  
kaj froston forpoluras**

**sur tero  
ĝis morto  
mi volas fiki  
(jes, tiu vorto)  
sentenere, instinkte  
sen artaĵa komforto**

**en karna  
omaĝo  
de karna vivo  
en plen-sovaĝo  
celebrante printempon  
en porkarna pejzaĝo**

## **Vejdo**

**printempo  
alvenas  
per verda vivo  
la mondon benas**



**por nova reviviĝo  
ĝi ĝis ebri' festenas**

**donacas  
ŝi al ter'  
junverdan veston  
al blua eter'  
ebriigan aromon  
kaj ĝojon al gea kver'**



# **Jianzi Mulanhua**

## **(Mallongigita Melodio**

### **Magnolia)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 4 versoj de 4,7; 4,7 silaboj kun para rimo.

#### **Eto**

#### **Narciso**

**kiel ino  
kvieta kun abstino  
akvon ŝatas  
la mondon fride gvatas**

**flavaj floroj  
pompas kiel dekoroj  
per aromo  
regas ĉambrojn de domo**

# Langtaosha

## (Ondo Lavas Sablojn)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de  
5,4,7,74 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,a,xa (x=senrima)

### Niuniu

#### Ŝtormo sabla

jen ŝtormo sabla—  
klingo sabra  
falĉas per bat' diabla  
konstruojn el betono  
ferŝtal-kabla

en polv' cinabra  
malagrabra  
mondo per paŝo krabra  
subiĝas al la ŝtormo  
venĝkapabra

\*La 22-an de marto, 2010, forta sabla ŝtormo balais 13  
provincojn de Ĉinio, kaŭzante grandan perdon.

## Linjiangxian (Feo ĉe Rivero)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de  
66,7,55 laŭ rimarangô xa,a,xa (x=senrima)

### Cindy Mckee (Usono)

#### Defloro

Floro hulahunas  
en flirta cirkulo  
en vento sen skrupulo.  
*"Ve, virta perdo  
pro briza rulo!"*

Sed la brizo glitis  
sub jupa kupulo  
laŭ korupta kalkulo.  
Deflora falo—  
grunda pustulo.

### Lily

#### Brizo inter floroj

persikfloroj pompas  
en venteta rulo  
brizo tiklas per lulo  
florajn pistilojn  
per milda trulo

**ĵus vekigis floroj  
en nebula tulo  
flirtas briz' per stimulo  
kun petallipoj  
per rosa ĉuro**

**Niuniu**

### **Persikfloroj ruĝas**

**persikfloroj ruĝas  
pro varma stimulo  
en printempa ondrulo  
balancas kapojn  
kvazaŭ baskulo**

**persikfloroj ruĝas  
kiel fajra brulo  
per koketa okulo  
invitas homojn  
al kuna lulo**

## **Manjiangong**

### **(Rivero Plenruĝa)**

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj po 11 versoj de  
434,344,77,353 / 33,33,54,77,353 silaboj respektive, laŭ  
rimaranĝo xxa,xxa,xa,xxa / xa,xa,xa,xa,xxa (x =  
senrima)

## **Guozhu**

### **Persista Esp-igo de Liaozhai**

(2010-01-30)

**Antaŭ dekoj/ da jaroj/ la ĵurhoru  
ankoraŭ/ freŝas ĝis nun/ en memoro:  
Traduki plenan 'Liao Zhai'/ por la  
patruja gloro,  
spite al/ mil baroj, ek al/ laboro!**

**Sen sorta/ favoro,  
kun arda/ adoro,  
ĉiam persisti/ kun fervoro,  
en transgeneracia/ stafeta kunlaboro  
konkorde/ kun la genia/ aŭtoro!**

## **Nangezi (Suda Kanto)**

ĉina fiksforma poemo el 4 versoj de 55,7,9 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Ĉion bonan!**

(dediĉita al Koffi Gbeglo, kiu kalumnias, tamen finas ĉiun kalumnian leteron per 'Ĉion bonan!', do li devas esti afabla ulo!)

**La pacamantoj  
diras nenion  
por bremsi kalumnion  
sed permesas rezignacion.**

**La pacamantoj  
vidas nenion  
krom plaĉan simpation  
kaj samidean harmonion.**

**La pacamantoj  
havos nenion  
post uloj prenas ĉion  
ĉar amo maskas apation**

### **Using the Loss**

**You know that hard rock**

**like a fist inside  
when your faith finally died  
and your naivete you cast aside?**

**Well, it is rock hard  
like a good, firm fist.  
Clenched in it, you can exist  
like a grownup in the real world's  
midst.**

**Eto**

### **Migrado norden**

**vico da gruoj  
sur blua ciel'  
alnorden migras kun cel'  
al la hejmloka prospera bel'**

**flugu jen flugu  
al la norda for'  
kun suda beleta flor'  
kun mia sopiro en la kor'**

**nord' jam varmiĝas  
kun sunluma bril'  
ŝvebu en venta facil'  
al mia fraŭlin' en maltrankvil'**



**transdiru al ŝi  
ke mi sincere  
petu al ŝi espere  
teni min en memor' kapere**



## **Pozhenzi**

### **(Kavalira Danco)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de  
66,77,5 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x = senrima)

## **Eto**

### **Grilo**

**grilo saltas kiel  
nigra not' muzika  
sin kaŝante en herboj  
aŭ en foli' brasika  
trilas lirika**

**en nokta vualo  
ĝi kun son' mistika  
lulas min en sopiro  
kun sentiment' komplika  
triste korpika**

## **Santaici (Tri Terasoj)**

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de ses silaboj kun krucrimo.

**Cindy Mckee (Usono)**

### **La mito-rompanto**

**panjo sciis ĉion  
kiam mi infanis  
mia frato el ŝi  
magie spontanis**

**tiam libroj naskis  
la mito-rompanton  
fakte, ĝi refutis  
la homo-trompanton**

**detale, en inko  
seke, ĝi raportis  
ke Che ekzekutis  
kaj Jesuo mortis**

*\* pri Che; El Che hispane (sed vi bezonas elekti alian lingvon)*

*[http://eo.wikipedia.org/wiki/Che\\_Guevara](http://eo.wikipedia.org/wiki/Che_Guevara)*

### **Sentitole**

**venis kunaj birdoj  
mi tremis kaj sidis**

**ili grakis laŭte  
senplende mi fridis**

**ĉirkaŭ tiu arbo  
nuksojn ili vidis  
lastajn de la vintro  
ili do rapidis**

**provianta arbo  
nigraj birdoj ridis  
mi ne volis morti  
mi fine decidis**

**la birdoj forflugis  
varmon mi avidis  
super pliaj nuksoj  
la arbo prezidis**

### **Sentitole**

**lunvirino vidis  
la amatan teron  
ŝi elverŝis al li  
arĝentan riveron**

**ŝi tiris krateron  
al la arĝenta flu'  
tuj enrampiĝis kaj  
remis al rendevu'**

**ĉe tera ektuŝo  
ŝi enfluis en lin  
likvo en solidon  
amo miksis ilin**

**nokte nur rigardu:  
ŝi al luna floso  
ŝatas sendi kisojn  
de arĝenta roso**

**Should I be Polite or Right?**

**Ĉu estu mi ĝentila aŭ prava?**

**In the fall of the tide -o--o-  
en la tajdofalo -o-o-o  
when the moon pulls away-o--o-  
ĉe luna retiriĝ' o-o-o-  
only air murmurs there -o--o-  
nur vento murmuras o-oo-o  
in the just vacant break. -o--o-  
en la vaka ŝiriĝ'. -o-oo-**

**Slithering up, unformed -o--o-  
Alrampas, senforma o-oo-o  
Miss I'm-Always-Polite  
Ĉiam-Ĝentila-Dam'**

murmuring vacantly,  
murmuras malplene,  
"For what's right, I won't fight."  
"Por prav', neniu dram'."

**Eto**

### **Lunlumo**

la klara plenluno  
en nokta silento  
disverŝas leĝere  
lumon de arĝento

ĝi vualas montojn  
kaj valojn per gazo  
velure opala  
en svaga okazo

la lunlum' en korton  
enfluas senbrue  
kovras ĝi la teron  
arĝente tremskue

ankaŭ luno en min  
injektas per sento  
milda kaj sopira  
al fraŭlina tento

**kvazaŭ mi en sonĝo  
jen mi trovus trance  
mia penso vagas  
libere kaj dance**

**flutario flosas  
jen de malproksime  
kiu volas verŝi  
koron flutesprime**

**Lily**

### **Banano de viro**

**sen vizaĝesprimo  
viroj tri en mano  
tenas la rigidan  
korpon de banano**

**kion ili volas  
per ĉi tiu nano?  
ha, fieras ili  
ege pri l' organo**

**volas ili bori  
per malmola kano  
en vaginon molan  
plenan je sukbanano**

**jen malfermu l' buŝan  
piĉon, ĝentlemano  
ĝin enŝovu glute  
kune kun ĉampano**

**legu:** <http://www.ipernity.com/blog/cezar/230508>



**Veĵdo**

### **Printempa mateno**

**ĉe fora horizont'  
ora sun' en lumglor'  
saltas el la maro  
en ĉi tre frua hor'**

**rosoj rebrilas per  
sunradio sur flor'  
kun folioj verdaj  
kun dolĉa bonodor'**



birdoj pepas voke  
bele kantas en ĥor'  
en arbaro plenas  
jam plezuriga ror'

homoj kun okuloj  
pezaj de dormstupor'  
ĵus vekigas el sonĝ'  
ĝin maĉas en memor'

lulas la zefiro  
herbetojn per favor'  
karezas la teron  
ankoraŭ en langvor'

### **Je lia prestiĝo**

mi ĉiam kondutas oj, oj...  
je lia prestiĝo oj, oj...  
kvankam kelktempe min oj, oj...  
atakas verstiĝo oj, oj...

li deliras pave oj, oj...  
tamen por lia fam' oj, oj...  
mi obeas ŝafe oj, oj...  
ĉu mi tro tristis jam? oj, oj...

**Viktoro**

## **Sovaĝa floro**

**banata en rosoj  
eta sovaĝa flor'  
sin skuas en brizo  
blovanta de malfor'**

**etendante brakojn  
ŝi kun trankvila kor'  
enspiras aeron  
freŝan en bonhumor'**

**nova tago venas  
el obskura kolor'  
certe ŝi reviglos  
en taga suna glori'**

**malfeliĉe ŝi jam  
tro en pompa dekor'  
eble morgaŭ nokte  
ŝi enkotiĝos for**

## **Shanhuazi (Monta Floro)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj de  
7,7,73 / 77,73 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xa / xa,xa (x=  
senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Post legado kaj post legado**

**Granduloj verkas grande,  
nur post legi demande,  
diversajn pensojn miksas  
kunfande.**

**Mensaj gisformoj muldas  
kion ni legas frande  
kaj per laŭdoj ornamas  
girlande.**

### **Bonan nokton**

**Ke vi dormu anĝele  
kaj songôjn songû bele.  
En sekva tago brilu  
juvele.**

**La songôjn portu poŝe-  
tenu ilin fidele.  
Poste, ili vin portos**

ĉiele.

**Lily**

### **Impulso**

ĉiame en via sin'  
impulso atakas min  
mi dronas pli aŭ malpli  
en fascin'

ĉiam en via brakum'  
min tiras amor-inklin'  
ĝis korpa kolapsado  
kun obstin'

### **Povra damo**

plende pri povra destin'  
ŝi ofte riproĉas lin  
pro manko de pasio  
kun sangvin'

ŝian fajron li vekas  
per lia maldura pin'  
ŝi brulas sed neniam  
ĝis kulmin'

## **Vejdo**

### **En krepusko**

**sin kaŝis la sunradi'  
kovras la teron vizi'  
ĝojsento kaj feliĉo  
apati'**

**kaj tristeco pogute  
ekdegelas sen konsci'  
el la memoro kiel  
la glaci'**

### **Sovaĝa floro**

**ŝi loĝas sovaĝlande  
ĝuas pejzaĝon frande  
kun libera enspiro  
rokrande**

**ŝi sin trovas ne sole  
kompanoj vivas bande  
amasas ĉirkaŭ l' monto  
rubande**

# Viktoro

## Montfloro

alte sur la monta rok'  
staras montflor' sen provok'  
svingante sin en zefir'  
sen sufok'

knab' aliras petole  
ŝin vidas kun rid' de mok'  
deŝiras semkompatate  
kia ŝok'



# Shengshengman

## (Lanta Sontreniĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 10 versoj  
respektive de 4,46,64,634,336 / 6,36,46,634,37 silaboj,  
laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa,xxa / a,xa,xa,xxa,xa (x =  
senrima)

## Vejdo

### Omaĝe al Mikola Klára

**kial Klára  
rapideme  
kiel stelo fala  
forlasis nin juna  
nia kara  
vi foriris haste  
en ĉi tag'  
februara  
senbrue  
senspure  
jen event' koŝmara**

**kvankam ordinara  
vi estas  
kun ago multfara  
vi aktivas**

**en la rond' transmara  
de samideanoj  
funebru  
kun amara  
sent' ni pri  
via merito rara**

*\*Mikola Klára estas hungara esperantistino kaj aktiva movadano.  
Ŝi forpasis pro malsano.*

(08-02-2010)





## Shiliuziling

### (Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,  
laŭ rimarangô a,a,xa (x=senrima)

#### Amo kaj Amoro

Mi lanĉis ĉineskan stafeton en la retejo Ipernity. Dum kelkaj tagoj jam 107 pecoj kontribuiĝis. Mi trovas tion interesa kaj kunmetis ilin ĉi tien laŭ tempa vico, por ke oni povu apreci ilin.

Lily

#### Lily

am'  
ardas kiel brila flam'  
geviroj  
ludas en la dram'

am'  
vojaĝas glate en pram'  
trans akvoj  
per forta dinam'

#### Yanke

am'  
konsistas el amalgam'

**dura ne  
fandiĝas en flam'**

**am'  
vera paŝadas sen lam'  
komforte  
jen sur makadam'**

**am'  
falsa sin mem per ornam'  
kamufilas  
kun kolora gam'**

## **Viktoro**

**am'  
la fidela per akklam'  
laŭdiĝas  
gajnas ja per fam'**

**am'  
vera ne estas reklam'  
necesas  
nenia ornam'**

**am'  
kaŝe malantaŭ piĝam'  
sin trovas  
kie dancas mam'**

## **Lily**

**am'**  
**de diboça melodram'**  
**bezonas**  
**boron per salam'**

**am'**  
**seksa sen vorta proklam'**  
**prezentas**  
**ludon sur tatam'**

**am'**  
**kontentiĝas per cunam'**  
**de ĉura**  
**ejakulo jam**

## **Eto**

**am'**  
**blinda formortos kvankam**  
**spicita**  
**per dolĉa proklam'**

**am'**  
**papilia kun fifam'**  
**ne estas**  
**kuraca balzam'**

**am'**  
**eterna sen ajn ornam'**  
**kondukas**  
**al perfekta dram'**

## **Vejdo**

**am'**  
**kun oldul' sen vigla flam'**  
**ŝajnas bird'**  
**kun hipopotam'**

**am'**  
**sen preta promes-proklam'**  
**egalas**  
**ja al nula gram'**

**am'**  
**efika de pigra dam'**  
**invitas**  
**al la nuda mam'**

**am'**  
**bone flegita sen lam'**  
**iras al**  
**bela panoram'**

## **Lily**

**flam'**

**volupta ekbrulas jam  
instige  
de koketa dam'**

**ram'  
la vira boras pro am'  
al piĉo  
kaj alloga mam'**

**jam  
prezentiĝas panoram'  
de amor'  
sur mola tatam'**

## **Yanke**

**sent'  
ama ne de elokvent'  
dependas  
sed de diligent'**

**pent'  
pri amoperda prezent'  
plu daŭras  
ĝis morta moment'**

**gent'  
donas amon laŭ prudent'  
ĉar ĝi 'stas**

eterna event'

## **Vejdo**

am'  
senmona kvazaŭ ŝi-ĉam'  
ne havas  
lakton en la mam'

am'  
sensenta en viva dram'  
egalas  
nur al diagram'

am'  
senbaza iras kun lam'  
pereos  
en eta cunam'

## **Lily**

in'  
amas lin kun korinklin'  
diboĉas  
ĝoje per vagin'

vir'  
amas ŝin kun seksdezir'  
ŝin boras  
per kaca rapir'

dam'  
ŝatas junulon kun flam'  
pro lia  
rigida salam'

## Eto

post  
amperdiĝo mi ĝis ost'  
doloron  
sentas de bak-rost'

hom'  
sen am' terure kun vom'  
sonĝas pri  
virina fantom'

ĝoj'  
pri hazarda am' ĉe voj'  
kondukas  
al laŭta plorboj'

## Yanke

am'  
pelas gevirojn al dram'  
amase  
per sensenta ram'

**sam'**  
**por ĉiuj paroj en am'**  
**vetludas**  
**ili pri bantam'**

**am'**  
**ŝajnas enkorpa inflam'**  
**ne daŭras**  
**ĝis fino de dram'**

## **Vejdo**

**fam'**  
**venas el fidela am'**  
**oni ĝin**  
**laŭdas kun aklma'**

**ĉam'**  
**serĉas amon en team'**  
**homoj en**  
**du persona dram'**

**mam'**  
**estas ne simbol' de am'**  
**sed ludil'**  
**en diboĉa dram'**

## **Lily**

**fik'**



**ĝoigas inon tra pik'  
penisa  
kun piŝta lirik'**

**fik'  
necesas en am-piknik'  
ja kiel  
vino el kalik'**

**fik'  
ne portas kun erotik'  
por ĉiuj  
kutima aplik'**

**fik'  
estas ama komunik'  
versas kun  
mira romantik'**

**fik'  
la paron per gratifik'  
vigligas  
kun bona efik'**

**fik'  
estas ama mozaik'  
metita  
kune per karn-brik'**

**fik'**  
**estas feliĉa muzik'**  
**saniga**  
**por senta fortik'**

**fik'**  
**estas amarba radik'**  
**profunde**  
**ĝis tera silik'**

## **Eto**

**ni**  
**en ama konversaci'**  
**sin trovas**  
**kore kun pasi'**

**ni**  
**alpremiĝas kun konsci'**  
**kap' ĉe kap'**  
**ĉe bela lili'**

**ni**  
**kveras kisas kun ebri'**  
**miele**  
**pro am-iluzi'**

## **Viktoro**

**am'**  
**ne konsistas el vigvam'**  
**ludlito**  
**sed el senta gam'**

**am'**  
**ne dependas de proklam'**  
**sed kuŝas**  
**en vivplena dram'**

**am'**  
**en voluptema piĵam'**  
**verŝajnas**  
**enkorpa inflam'**

**am'**  
**vivas nur de pan-salam'**  
**mucidos**  
**kaj putriĝos jam**

## **Lily**

**al**  
**par' en amo generfal'**  
**verŝajnas**  
**velkinta petal'**

**al  
par' sen seksa festival'  
nur vivo  
daŭras kun banal'**

**al  
paro kun trompa vual'  
la vivo  
ekiras al mal'**

**al  
li vivi kiel vasal'  
sub ŝi ne  
agi kun vola ŝtal'**

**al  
ŝi vivi kun la vual'  
kondukas  
al futura pal'**

## **Viktoro**

**Ŝi kaj mi  
mi  
ŝin amas arde kun pi'  
stultete  
dronas en ebri'**

**ŝi**

**min kisadas kun pasi'  
feliĉe  
en ama radi'**

**mi  
diras al ŝi per litan'  
"mi amas  
vin" kun emoci'**

**ŝi  
respondas per vorseri'  
"ankaŭ mi,  
ĉiam sen fikci'"**

**ni  
vivadas en harmoni'  
bonorde  
en sama lini'**

**sed  
jen ni kverelas sen ced'  
pro mia  
nelava pied'**

**ŝi  
ŝiras harojn kun mani'  
blasfemas  
"tuj foriru vi"**

**mi**  
**respondas per laŭta kri'**  
**kolere**  
**"vi naŭza simi!"**

**ŝi**  
**ektraktas min kun glaci'**  
**malvarme**  
**sen am-incendi'**

**mi**  
**turnas la dorson al ŝi**  
**ignore**  
**vole kun konsci'**

**fin'**  
**ama pro nia obstin'**  
**iras al**  
**disiĝa destin'**

## **Erzsebet Tuboly (Hungario)**

**Pri amo en tro matura vivperiodo**

**am'**  
**por maljunul' vera dram'**  
**amiloj**  
**ve, senutilas jam**

am'  
fajrero naskita flam'  
frostiĝis  
cindro estas jam

am'  
korpa anima balzam'  
doni ĝin  
neniu venas jam

am'  
bruligis korpon mian  
sed kiam?  
ĉu vere iam?

am'  
maljunula epigram'  
pri pasint'  
beliga ornam'

sent'  
pri amorkapablo cent'  
nur revo  
forportis la vent'

**Amo mezaĝe**

al

**amorado animal'  
nudiĝu  
korpon sen moral'**

**akt'  
en stranga pozo abstrakt'  
instigas  
pli fortan kontakt'**

**aĉ'  
estas pri ni la klaĉ'  
amoras  
ni propra plaĉ'**

**piĉ'  
unika put' de feliĉ'  
por viro  
bori sen kondiĉ'**

**viv'  
ĉu valoras sen lasciv'  
prijuĝi  
restu objektiv'**

**Lily**

**piĉ'  
voluptemula fetiĉ'  
regalas**



**kacon per feliĉ'**

**piĉ'**  
**je kaco krias per kriĉ'**  
**renkontas**  
**lin per suka riĉ'**

**piĉ'**  
**por kaco la sankta niĉ'**  
**servpretas**  
**per karna sandviĉ'**

**piĉ'**  
**trenas viron al feliĉ'**  
**ridas li**  
**kun senta sufiĉ'**

**piĉ'**  
**sin oferas sen kondiĉ'**  
**al kaco**  
**per suka dediĉ'**

**kac'**  
**boras ĝoje kun aŭdac'**  
**ripete**  
**piŝtas sen ajn lac'**

**kac'**

**saltas kun firma tenac'  
en piĉo  
sur mola matrac'**

**kac'  
ĝojigas ŝin per kurac'  
eniras  
sen ajna minac'**

**kac'  
kvietigas ŝin per pac'  
konsole  
jen en suka ŝmac'**

**kac'  
por ŝi ĝojiga donac'  
prezentas  
kontenton per grac'**

**Cindy Mckee (Usono)**

**La vivsparko, amo**

**am'  
mistera manko ĉiam  
ĉu eble  
viv-daŭriga flam'?**

**kvark'**

de startiga patriark'  
al polvaj  
karbonaĵoj, spark'

viv',  
biologia motiv'  
sen kiu  
estus morta driv'

## **Eto**

en  
amo kvazaŭ en katen'  
geparoj  
baraktas kun ĝen'

am'  
falsa ĉiam kun ornam'  
verŝajnas  
brila fiŝa skvam'

ju  
pli da miela vortflu'  
des pli da  
intima detru'

fraŭd'  
en amo falos kun plaŭd'  
meritas

**aron da mallaŭd'**

**tromp'  
en amo kun vorta pomp'  
fiaskos  
per renoma romp'**

**pac'  
inter paro estas spac'  
libera  
de viv' sen minac'**

**pac'  
ne dependas de kis-ŝmac'  
dolĉa sed  
de homa sagac'**

**for  
de perfidema amor'  
la paro  
pacas sen dolor'**

**ĝu'  
de amo nur inter du  
longdaŭras  
vere sen enu'**

**am'**

sen amor' nur estas dram'  
sen ludad'  
de gong' kaj tamtam'

## Cindy Mckee (Usono)

### Balzam'

am'  
estas konsola balzam'  
kontraŭ si.  
konflikta proklam'!

las'  
de vi malferma post pas'  
de amo  
estas embaras'

sed  
kara, sentmanka posed'  
estas nul'  
Aŭskultu al pled':

ĝu'  
repagos kontraŭ korsku'  
ne ĝemu,  
"Ve - neniam plu"

ĝoj'  
venas de la nuna voj'

**Antaŭo**  
**mortis en ĉi-foj'**

\*\*\*\*

## **Cezar (Germanujo)**

### **Maljunula Plendo**

**Jun'**  
**pro vanto kaj tro da sun'**  
**nur ridas**  
**pri mister' de l' Lun'.**

**Jun'**  
**pro pigro kaj oportun'**  
**ne revas**  
**pri socikomun'.**

**Jun'**  
**pro stult' kaj iluzi'**  
**nur fidas**  
**plu - pro spit' - al si.**

## **Cindy Mckee (Usono)**

### **Erĵi apudas**

**flor'**  
**hungara kun bona kor'**  
**jen, Erĵi**  
**amika trezor'**

**ŝi  
kapablas je simfoni'  
poema  
vorta ambrozi'**

**lud'  
gajas kun Erĵi-inklud'  
mi ĝojas  
pri Erĵi-apud'**

\*Erĵi = Erzsebet, hungara samideanino

**Erzsebet Tuboly (Hungario)**

### **Juneco**

**Jun'  
Karese varmiga sun'  
Foras jam  
Iĝis mi klaŭn'**

**Jun'  
Fole flugis sub la Sun'  
Nia kant'  
Pri fora aŭtun'**

**Jun'  
Buntaj floroj brila Sun'  
La korojn**

**Ne kovras la prujn'**

**Jun'  
Printempa brilanta sun'  
El pasint'  
Varmigas ĝis nun**

**Jun'  
Printempa brilanta sun'  
El la for'  
Belas por aŭtun'**

**Jun'  
Fulmorapida tajfun'  
Forflugis,  
For, al pala Lun'**

**Jun'  
Gravas nur ĝojo, nur "nun"  
Ŝajniĝas  
Nebule "aŭtun' "**

**Lily**

**Al Erzsebet Tuboly**

**Vi  
jam faris provojn kun pi'  
bongustajn**



**je ĉin-poezi'.**

**Sent'  
inklina al orient'  
ja naskis  
versojn kun talent'.**

**For  
de ni vi beleta flor'  
hungara  
vivas en sun-glor'.**

**Pen'  
via daŭra en ĝarden'  
ĉineska  
fruktos per festen'.**

## **Vejdo**

### **Ŝtono en rivero**

**ŝton'  
kuŝas en rivera dron'  
mil jarojn  
silente sen son'**

**ond'  
post ond' ĝin lavas per tond'  
ĝi formas  
figuron de rond'**

**ĝi**  
**dankas ondon kun pasi'**  
**pro donad'**  
**per ronda lini'**

**ĉu**  
**homoj en socia sku'**  
**fariĝas**  
**rondeca sen bru'**

**per**  
**flato ili kun prefer'**  
**kaĵolas**  
**mastrojn kun fier'**

**aŭ**  
**artifikas hodiaŭ**  
**aŭ ruzas**  
**al oni morgaŭ**

**Viktoro**

**Bonvenon!**

**dediĉe al Cezar**

**ond'**  
**nova al ĉineska rond'**  
**ensvarmas**

**kun varma respond'**

**sent'**

**amika el okcident'**

**alportas**

**homon kun talent'**

**por**

**atingoj en verda glor'**

**ni penu**

**kun granda fervor'**



Cezar

## **Sumuzhe (Virina Ĉapo)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 7 versoj de 33, 45,  
7,45 silaboj, laŭ rimarangô xa,xa,a,xa (x= senrima)

### **Sero**

#### **Sablera Ŝtormo**

**sin ĵetas  
ciklono  
kun sableroj  
kaj akraj ŝtonoj  
la muĝanta ventsono  
ludas triste  
per fanfarono**

**ĝi vipas  
per sprono  
domojn homojn  
ĝi sen pardono  
pentras kiel fripono  
vastan teron  
per okra tono**

## **Tiaxiaoling (Flirta Kanto)**

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

### **Cezar (Germanujo)**

#### **Hurlado patria**

(2010-02-23)

**Fia, fia  
hurlado patria!  
kriad' el Sodomo  
pro stulto laŭ Romo.  
"Moro, moro",  
krias greg' dum horo!**

#### **Plagata edzo**

(2010-02-23)

**Sekstag', sekstag'!!  
Tia in' estas plag'.  
Kaptante laŭ bubo  
ŝi falas ĉe rubo:  
"Boru, boru,  
ni tuj ekamoru!"**

## **Tigro, tigro!**

**Tigro, tigro  
kun flav' kaj stri-nigro  
al la hom' senpova.  
Do ne plu bontrova.  
Varo varo  
sur felobazaro.**

## **Tango**

**Tango,  
tango,  
ambaŭ vang' al vango  
ŝvelas sang' ĝiskreve.  
Ambaŭ paŝas reve.  
Vere,  
vere,  
logas takt' konkere..**

**Cindy Mckee (Usono)**

## **La foko en bestĝardeno ŝatas trinki...**

**naĝo, naĝo  
apud arta plaĝo  
Spektantoj sur doko.  
Al soifo foka  
kafo, kafo  
en granda karafo**

## **Unua provludo**

**Konu, konu!  
Koncerton ni donu  
laŭ stilo baroka  
Ludu je la sepa!  
Pase, pase  
ekis mi frakase**

**surde, surde,  
ja, vere absurde  
ŝrikis per trombono  
en terura tono  
noto, noto  
groteska el gloto**

**Eto**

## **Sopire**

**kore, kore  
tiras sent' dolore  
rememoron veku  
imagadon eku  
kune, kune  
kun fraŭlino nune**

## Guozhu

### TRUDA REKLAMO

(2010-02-13)

**Truda, truda  
reklamo tro kruda!  
Pro em' monavida  
de ĉef' televida.  
Sub neonlum' arka  
enmeto rimarka.  
Akra, akra  
krio vipas sakra!**

S-ro Reĝisoro de CCTV,  
Ne enmetu la amuzan vesperkunvenon inter reklamoj !  
Kion ni vidas en CCTV antaŭvespere de la Printempa  
Festo 2010,  
ne amuzan vesperkunvenon, sed reklamojn!

## Lily

### Amludo

**pene, pene  
iras kac' senĝene  
en piĉon pilgrime  
ja ambaŭ intime  
meti, meti**



**por boron ripeti**

**lude, lude  
petolu senprude  
la afer' prefera  
la kontakto vera  
rave, rave  
do orgiu brave**

**krie, krie  
li boras pasie  
ŝi ĝemetas kun ĝu'  
ravas plezure du  
dure, dure  
piŝtas kac' susure**

## **Vejdo**

### **Milda edzino**

**edzin', edzin'  
al mi kun korinklin'  
hejmsidas ĉiame  
prizorgas min ame  
ema, ema  
al kisado ĝema**

### **Songê**

**svage, svage**

penso iras vage  
bonŝanca loteri'  
pagas min per premi'  
mire, mire  
mi ĝojas delire

## Viktoro

### Tigro

tigro, tigro  
kun strioj de nigro  
reĝo ĉiopova  
laŭ volo bontrova  
vora, vora  
kun sono horora

### Feroĉa tigro

tigro, tigro  
manĝanto en migro  
kun kapric' barbara  
en mondo arbara  
raba, raba  
per ungego klaba

## Wanghaichao

### (Rigardo al Martajdo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 11 versoj de 446,  
446,5,54,47 / 6,54,446,5,54,47 silaboj, laŭ rimaranĝo  
xxa, xxa,a,xa,xa / a,xa,xxa,a,xa,xa (x = senrima)

### Vejdo

#### Al Aŭrora (Mao Xiaoli)

okaze de ŝia naskiĝtago (2010)

Al Aŭrora  
mi prezentu  
pro ŝia diligent'  
bondeziron  
kaj saluton  
en ĉi gaja moment'  
post longa atend'.  
En nia movad'  
kun kora sent'  
ŝi laboras  
varme ĉiam en silent'.

Ŝi sen indiferent'  
zorgas pri verda  
afer' sen pent'  
de l' asoci'

**ĝis l' E-movad'.  
Ŝi en nia taĉment'  
agas kiel vent'  
aktivas jam per  
bona prezent'.  
Ho, Aŭrora,  
plu daŭrigu sen ostent'.**



## **Yanermei (Ĉarma Okulumo)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj de 5 versoj de 7,5,  
444 / 75,444 silaboj, laŭ rimarangô a,a,xxa / xa,xxa  
(x=senrima)

### **Viktoro**

#### **Sorĉa okulparo**

**ŝi belas per okulpar’  
de akveca klar’  
sorĉe loga  
kaj koketa  
sen ajn kompar’**

**ŝin junuloj svatigas  
jen per amdeklar’  
nur pro ŝiaj  
okultruoj  
ve, kun erar’**

# Yexingchuan

## (Nokta Ŝipvojaĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 6 versoj de  
7,34,446 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xxa (x = senrima)

### Vejdo

#### Songô vaganta en la koro

songô fulmas en la kor'  
tra jaroj  
el fremda for'  
sed nur fraŭlin'  
en mia songô'  
rolas kiel aktor'

sublune ĉe lekantflor'  
rigardas  
mi en lunglor'  
ŝian korpon  
seksallogan  
mi miras kun ador'

en lagakvo de aŭtun'  
ni naĝas  
nure en kun'  
en okuloj

**niaj ĉio  
fariĝas nulo nun**

**neeste en mia brakum’  
ŝi ĝemas  
kun dolĉa zum’  
ni sentas nin  
ebriiĝa  
en feliĉa fortun’**

**jen en arbara kviet’  
ni kveras  
ĉe nokt-retret’  
mi deklaras  
amon al ŝi  
per firma ĵur-ripet’**

**ŝi jam kun voĉa falset’  
ekflustras  
per buŝ-almet’  
“mi vin amas”  
malkaŝante  
vualon de sekret’**

**nun falas neĝo frida  
flirtanta  
kun insida  
blanka reto**

**ŝi foriras  
kun mien' malfida**

**en sopiro senbrida  
mi tamen  
am-avida  
la esperon  
kovas ĉiam  
kun koro konfida**





## **Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)**

ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj  
laŭ rimarangô xa,xa,a (x=senrima).

### **Lily**

#### **La hirundo**

**La hirund'  
sola kun sufer'  
forlasante min iras  
foren el sia hejmtter'  
Mi vin kun tener'**

**tagnokte  
pensas izola:  
vi neniam sentiĝu  
iome senkonsola.  
Ĉe mi memvola**

**restados  
ja via nesto,  
ĝis la varma sezono  
revenos al ekesto  
kun ĝoja festo...**

**Ĉi tie  
ve, en aresto**

**alia bird' sin trovas  
suferas de molesto  
de l' rega pesto.**

**Al mi mem  
vundas la dolor'  
kruele senkompate,  
mia patri' en ĉi hor'  
ankaŭ estas for.**

**Senhejme  
mi tagojn trenas  
mizere malfacile,  
mia koro eltenas  
tempdaŭr' min ĝenas.**

**Kara bird',  
renkontiĝos ni  
ambaŭ en fremda lando.  
Mia sopir' al naci'—  
la balzam' por mi.**

*adaptita el kanzonteksto tradukita de Wel*

<http://www.ipernity.com/blog/e-sento2009/230698>

# Mandio

## En Songô

en songô  
mi 'stas lariko  
vibre skuas en vento  
kontraŭ la frosta piko  
kaj nebul-diko

en songô  
mi estas aglo  
plongâs rekte de monto  
al homplena spektaklo—  
vera miraklo

en songô  
mi estas ondo  
saltas sur blua maro  
fore de homa rondo—  
jen vagabondo

en songô  
mi estas bovo  
paŝtigas sur herbejo  
kun facila rongmovo  
en briza blovo

en sonĝo  
mi estas bebo  
suĉas mamon de l' patrin'  
kun manoj en svingŝvebo  
per buŝa strebo

en sonĝo  
mi ĉiam restas  
en ekstazo kaprica  
en libereco nestas  
ĝojo ekestas

## **Vejdo**

### **Hirundo revenas**

hirundo  
revenas nune  
kun printempa lumbrilo  
la tero ridas june  
rojo fortune

hirundo  
nune revenas  
kun primavera varmo  
sunlumo ĉie plenas  
glaci' jam svenas

hirundo

**revenas jame  
kun viviga etoso  
floraro pompas flame  
buntas malsame**

**hirundo  
jame revenas  
kun nutra eliksiro  
birdoj ĝoje festenas  
bestoj promenas**

**hirundo  
revenas ĉe min  
kun vigliga pepado  
mi ĉineskas kun sangvin'  
per mensa maŝin'**



# Yongyuyue (Ĉiama Ĝojo de Renkontiĝo)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 12 versoj de  
444,445,446,346/ 446,445,446,344 silaboj, laŭ  
rimaranĝo xxa, xxa, xxa, xxa (x=senrima)

**Cindy Mckee (Usono)**

## **Modelo**

en la naskiĝtago 2010 de Guozhu

**la kuraĝon  
vi elmontris  
nin inspiras  
Kaj ni vidas  
vojon kiun  
vi pioniras,  
tra branĉoj de  
kontraŭstaro  
kiujn vi forŝiras  
poete  
Esperante  
freŝ-voje vi iras**

**bonekzemple  
ĉe la fronto  
aliajn vi tiras**

**pli kaj pli da  
ĉineskaĵoj  
ĉiuj akiras  
pli kaj pli da  
sentimeco  
ni pro vi aspiras  
Modelo,  
daŭru longe  
ni deziras!**

**Guozhu**

**Naskiĝtage 2010**

**(2010-02-03)**

**Naskiĝtaga/ datreveno/ en kvieto  
primavera/ proksimiĝas./ Ĉu nur ripeto  
per muziko, / ovokuko,/ aŭ franda kotleto?  
Orgio/ estu for de/ piema asketo!**

**Kio plaĉas/ kaj ĝojigas/ al verda poeto  
estas frukto/ de versado/ en kabineto  
ke eLibro/ novfarita/ jam estas en preto  
kaj baldaŭ/ aperos en/ interreto!**

**Lily**

**Poet' sen sekret'**

dediĉe al Guozhu je lia naskiĝtago 2010

**la riĉaĵon  
vi kolektas  
nia poet'  
en la ĝarden'  
de ĉineskoj  
ne la monan sed  
la spiritan  
vi nun faras  
rikoltadon kun pret'  
pro tio  
ke vi verkas  
senĉese kun ripet'**

**diligento  
laboremo  
estas via sekret'  
vi talenta  
ĉineskisto  
kun tuta posed'  
de verkarto  
ĉiam verkas  
poemas sen forĵet'  
vi vere**



'stas modela  
nia portret'

## **Vejdo**

### **Poemdonaco**

okaze de la naskiĝtago 2010 de Guozhu

**antaŭ jaroj  
vi dissemis  
en diskreto  
en ĝardeno  
de ĉineskoj  
por san-vegeto  
laboreme  
vi kultivas  
plantidojn kun preto  
volante  
ke plenkresku  
ili kun koketo**

**nun jam staras  
altaj arboj  
kiel minareto  
kun densaĵo  
de folioj  
pen' kun impeto  
rekompencas  
jam vin riĉe**

**per laŭda almeto  
jen bona  
or-pokalo  
por poeto**



**Guozhu**

## **Yujia'ao (Fiŝista Fiero)**

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj po 5 versoj de  
7,7,7,3,7 silaboj kun kontinua rimo

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Sentitole**

**Kveraj vortoj kolore  
fluis el li adore.**

**Lin ŝi traktis favore-  
amkore,  
almenaŭ provizore.**

**Tio iras vapore,  
forflugas laborhore.  
Li nun scias stupore  
ve-plore,  
ŝi laboras klitore.**

**Guozhu**

### **Taglibro de Buroestro**

**1.**

**Ekcirkulas furora  
la Taglibro amora,  
de buroestr' sinjora,  
fetora**

**membr' de Partio glora.**

**Kia gusto sapora?  
En konfeso aŭtora,  
senpruda, senpudora:  
ĝiskora  
korupto fiadora.**

**2.**

**Kio en plan' labora  
allogas lin fervora?  
Bankedo ĝojhumora.  
Multhora  
voluptĝuo piĉbora.**

**Pri moralo ignora,  
mamonismo adora,  
sur sidloko favora,  
honora,  
Kvazaŭ iĝas novmora.**

## **Yulinling (Tintado en Pluvo)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun 11 kaj 12 versoj  
respektive de 4,44,644,65,347 / 7,35,634,426,345 silaboj,  
laŭ rimaranĝo a,xa,xxa,xa,xxa / a,xa,xxa,xxa,xxa (x =  
senrima)

### **Niuniu**

#### **Morto de poetino**

**la poetin’  
kun juna aĝ’  
ĝis la vivfin’  
jam laboris pene  
dum tuta viv’  
kun korinklin’  
jen al poezio  
verkis kun obstin’  
serion  
da poemoj  
kun sublima sent-kombin’**

**poem-idojn post rafin’  
ŝi naskis  
el mensa uzin’  
ilin ŝi trezoris  
dorlote  
kiel mem ŝin**

**sed, malfeliĉe  
ŝin ja  
mortigis heroin'  
venena  
la karier'  
iris al ruin'**



pentrita de Eder Benedetti (Brazilo)

## **Yumeiren (Belulino Yu)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po kvar versoj  
de 7,5; 7,9; / 7,5;7,9; silaboj kun para rimo.

### **Ardo**

#### **Al Cindy kaj Vejdo**

Ne ploru kaj ne larmu  
ne sango svarmu  
la miskompreno haltu  
la samaj pensoj arde saltu

Vi amikiĝis karaj  
la paro rara  
ĉineskoj kontinuas  
senlimaj sentoj interfluas

### **Cezar (Germanujo)**

#### **Submaske**

Se homoj sin komprenus,  
kunen eĉ venus,  
amikeco avancus,  
eĉ sur la stratoj ni ekdancus.

Sed kreskas miskomprenoj  
kaj fi-sintenoj.

Homoj homojn ne fidas  
kaj nur la maskoj dancas, ridas.

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Pontlingve**

Mi ploras, mi ne larmas  
konfuzo svarmas  
Ĉu mi al vi nur strangas?  
Ĉu ĉiulingve sango sangas?

Vi ne dividas pensojn  
nek pensas sensojn  
Ĉu vere ni parolas  
aŭ nekomprene samsimbolas?

**Vejdo**

### **Miskompreno**

miskompreno jam svarmas  
sango malvarmas  
amikeco lavangas  
en oceana ondo tangas

ni havas malajn mensojn  
variajn sensojn  
vortoj vere frivolas  
miskompreniĝo nin izolas



## **Sincereco sufiĉas**

**sorto nin firme tenas  
nenio ĝenas  
kvankam ni ja distancas  
nia renkontiĝo bonŝancas**

**fidon starigu kune  
komprenon nune  
se amikec' sin kondiĉas  
nure sincereco sufiĉas**

## **Viktoro**

### **Dormanta Budao**

**Budao en trankvilo  
dormas dum milo  
da jaroj sen ĉagreno  
libera de hommonda ĝeno**

**eternas la rideto  
ĉe buŝgiĉeto  
en paca brila sano  
jame de profunda nirvano**

## Zhuzhici (Bambuoj)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de sep silaboj laŭ  
rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

### Cezar

#### Impulso pro letero

Ĉe danc' sur koridoro  
en ne tro frua horo  
li ŝvebis papilie  
feliĉa pro favoro.

Ne estis do ignoro  
aŭ tro rigida moro.  
"Nur trajno malfruiĝis",  
ŝi skribis kun fervoro.

Ŝi nomis lin sinjoro,  
amata trobadoro.  
Nun dancas li sur nuboj  
kaj revas pri amoro.

### Cindy Mckee (Usono)

#### Pulso

juna planto en ĝarden'  
sternas sin en huma ben'

**en karesa tera man'  
sub aero de saten'**

**pulsis ĝermo de poem'  
inter tero kaj la sem'  
pulsis planto tra la ter'  
verse en la vivo-skem'**

### **Nia diurno**

**birdo flugas inter ni  
flugas laŭ trajektori'  
kun oro de la suno  
flugas al lunpozici'**

**birdo portas inter ni  
portas de sunincendi'  
orfajron al palnokto  
portas varmon al glaci'**

**birdo trenas inter ni  
trenas amon en radi'  
kun palo de la luno  
trenas roson al Heli' (Helios)**

**lumradioj en tensi'  
reciproka rotaci'  
ni fluas kaj flugas en  
antipoda simetri'**

**Lily**

### **Impulso en printempo**

**post longa frid-rigoro  
impulsas jam la koro  
jen kiel verdaj plantoj  
ĉe la printempa horo**

**ne haltu vi sinjoro  
nun kvankam en stuporo  
de vintra neagemo  
denove ek al boro**

**vetero en favoro  
kaj ni en bonhumoro  
ekscitas certe ludon  
de nia seks-esploro**

### **Renkontiĝo por amoro**

**Ili jam en koridor'  
renkontiĝas en ĉi hor'  
kisas kaj brakumas nun**

**ĝoje jen en bonhumor’.**

**Brulas jam nun lia kor’  
ne plu restas la sinjor’.  
Li ŝin tiras al litĉambr’  
por amludi per amor’.**

**En la lito kun fervor’  
li eniras ŝin per bor’.  
Post ekstaza sekskulmin’  
ili lacas kun langvor’.**

## **Viktoro**

### **Primavero de poezio**

**floroj, brizo kaj junverd’  
sunradi’ kaj birdkoncert’  
disverŝiĝas sur kampvoj’  
ter’ vekigigas sen inert’**

**primaver’ en poezi’  
esprimiĝas kun pasi’  
buntkoloraj bildoj jam  
prezentiĝas en seri’**

## **Vejdo**

### **Reviviĝo de Fenikso**

**laŭ antikva tradici'  
la feniks' en incendi'  
ĉiukvincentjare jam  
sin oferis kun konsci'**

**ŝi kunportis jen kun si  
la suferojn de l' naci'  
la mizerojn de l' popol'  
la turmentojn de vari'**

**volis ekbruligi ŝi  
malbonaĵojn kun pasi'  
per fajrego el ĉiel'  
ĝis cindreroj sen ajn stri'**

**ŝi sin ĵetis sen ĝemkri'  
en fajregon ardan pli  
flamoj saltis jen kaj jen  
kun ignor' sen simpati'**

**fulme kvazaŭ per magi'  
ŝi elflugis el embri'  
de la cikla reviviĝ'  
kun tutnova plumradi'**

## **Zuihuayin (Ebrio sub ombro de floroj)**

ĉina fiksforma poemo el du strofoj po 5 versoj de  
7,5,545 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xxa (x=senrima)

### **Cezar (Germanujo)**

#### **Spuron mi pentras, mian propran**

**Baladeskas mia sent'  
eĉ en malkontent',  
mi trobadoro  
sen popolo,  
plu kantas al vent'.**

**Ne necesus eĉ koment'.  
Mi paŝas sen pent'.  
Spuron mi pentras,  
mian propran,  
kun aŭ sen konsent'.**

#### **Internacia Tago de l' Ino en la jaro 2010**

**Ha, min kaptas vigla sent',  
Vivu bela ina gent'!  
Gratulon, damoj,  
Pro la tago!  
Jen roz' pro konsent'!**

**Al vi mia kompliment'  
Kaj kison eĉ sen pent'!  
Portas ĉion  
Via amo.  
Festu kun kontent'!**

### **Persvado**

**Ne, ne estas vi viktim'.  
Estas simple tim'.  
Imago estas  
ne jam ago,  
katen' eĉ kaj lim'.**

**Ne do fuĝu de intim'.  
Seks' ne estas krim'.  
Nur la rezigno  
estas perfid',  
vera fi-kutim'.**

**Cindy Mckee (Usono)**

### **Bedaŭro je morto**

post legado de 'Spuron mi pentras...'

**Malantaŭa rigardo—  
tiu bastardo  
de rompaj spuroj  
legitimas min—**



**mia boardo.**

**Mi ventiris, kovardo—  
lasis al jardo  
kaj vento gvidi  
interĝire  
ĝis mort-bolardo.**

Glosaro:

*boardo*: ĉiu parto de la ŝipirado inter du ĝiroj

*la du ĝiroj*: nasko kaj morto

*bolardo*: paliso sur kajmuro, uzata por alligi ŝipon

**Lily**

**En halucin’**

**ebrie de halucin’  
kun kac’ en vagin’  
li energie  
tordas korpon  
sur ŝi kun obstin’**

**stranga sento kaptas lin  
per sorĉa fascin’  
povra ludanto  
li neniel  
venas ĝis kulmin’**

## **Vejdo**

### **Bondeziron al virinoj**

okaze de la Internacia Virina Tago (2010)

**kun sincera sentiment'  
mi al ina gent'  
respekte sendas  
bondeziron  
en festa moment'**

**pro iliaj diligent'  
kaj saĝa latent'  
kaj laboremo  
kaj l' plej granda  
am' sub firmament'**

### **Kien mia vivspuro?**

**kien mia vivspuro?  
post longa kuro  
mi serĉas pene  
sed jen vane  
kun malplezuro**

**kvazaŭ blanka ŝaŭm-pluro  
ĝia figuro  
tute vanuis  
en profunda**

**mara obskuro**

**Viktoro**

**Floro en vento**

**plendas flor' kun trista sent'  
pri venta turment'  
pro sia tigo  
rompiĝema  
dum blova moment'**

**ŝi ne povas kun ostent'  
paradi en vent'  
ŝiaj petaloj  
dise falas  
teren kun ve-pent'**

